William Shakespeare,

# Sonedo 1

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Pliiĝon ni deziras de la dioj,
Por ke pludaŭru ĉiam la belec'
Kaj ke per novaj hom-generacioj
La viv' ne ĉesu en la estontec'.

Sed vi, kontenta pri supraĵa sci',
De via fajr' avara memnutranto,
Malsaton en abundo faras vi,
De via mem' vi estas minacanto!

De la juneco freŝa vi ornam',
Heroldo sola de l' printemp-sezon',
Kaŝiĝas en la brusto via flam',
Perdiĝas tiel la plej kara bon'.

Eluzu vian donon, por ke ĝi
Ne neniiĝu en la tomb' kun vi.

*Traduko de la Angla poemo "Sonnet 1" de* WILLIAM SHAKESPEARE *(∗1564-04-13 – †1616-05-03) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-12-20.*

*MR-110-01 / Arg-491-954 (2009-03-27 11:06:43)*

*Esperantigo laŭ la germanigo verkita de Johann Gottlob Regis (Johano Diopaco Regiso, 1791 – 1854)*